

2/2018

Marto
Aprilo

ISSN 0032-2431

Pola Esperantisto

Revuo de Pola Esperanto-Asocio



- ★ Solece ĉirkaŭ la mondo
- ★ Omaĝe al Zuzanna Kawulok
- ★ E-movado en Bydgoszcz daŭras jam 110j

Pola Esperantisto

Dumonata revuo de Pola Esperanto-Asocio. Fondita en 1908.

Eldonanto

Pola Esperanto-Asocio
ul. Gen. W. Andersa 37/59 a
00-159 Warszawa
<http://www.esperanto.pl>

Ĉefredaktoro

Robert Kamiński, rk-lodz@wp.pl

Kunlaboro

T. Nemere, M. Tatara,
A. Wilkus,

ABONOJ

La abono por 2018 - por 6 numeroj (papera):

Pollando - 50 zlotoj
eksterlando - 20 eŭroj
Cifereca (pdf)
Pollando - 25 zlotoj
eksterlando - 10 eŭroj

Pagendaj al la konto:

PL 37 2130 0004 2001 0558 6110 0002
swift INGBPPLPW

La mendon provizu per informo, al kiu
adreso estu sendata la revuo.

ATENTO

Abonoj per eŭroj validas post aldono
de 5 eŭroj por la bankaj kostoj.

Polan Esperantiston eblas aboni per

Konto de PEA en UEA: [peaa-v](mailto:peaa-v;);

Detaloj troviĝas ĉe:

http://www.uea.org/alighoj/pag_manieroj.html

Presejo

BŁĘKITNE STUDIO

ul. Chopina 6, 44-100 Gliwice

Estraro de PEA

Aleksander Zdechlik - prezidanto

Teruo Matsumoto - vicprezidanto

Robert Kamiński - sekretario

Alina Mozer - kasisto

Agnieszka Mozer - estrarano

Marek Mazurkiewicz - estrarano

Ĉefdelegito de UEA

Stanisław Mandrak:

stanislaw.mandrak@gmail.com

Peranto de UEA

Jan Skonieczka: jaskon@op.pl,

Pri la skribitaj artikoloj
respondecas
la aŭtoroj mem.
Ricevitajn manuskriptojn
oni ne resendas.
La redakcio rezervas al si
la rajton mallongigi
kaj korekti la tekstojn.
Represo kaj tradukoj nur
kun indiko pri la fonto



Pola Esperanto-Asocio
Polski Związek Esperantystów

Fronta kovrilpaĝo - Małgorzata Komarnicka kun novaj lernolibroj
sur ĉefplaco de Krakovo. Fotis Magdalena Tatara

Enhavo

Redaktoraj vortoj	2
Eventoj	
<i>Robert Kamiński</i> , Pri traduko de "Sinjoro Tadeo" en la toruna liceo	3
<i>PEA en Szczecin</i> Ankoraŭ pri evento okaze de mortodatreveno de L. Zamenhof	4
<i>Małgorzata Komarnicka</i> , "Sinjoro Tadeo" en Muzeo de Sinjoro Tadeo en Wrocław	4
<i>Andrzej Korniluk</i> , Esperanto movado en Bydgoszcz daŭras jam 110 jarojn	6
<i>Robert Kamiński</i> , La 101-a mortodatreveno de la kreinto de Esperanto	8
<i>Maria Pokrzywnicka</i> , Pri Oomoto en muzeo	9
<i>Robert Kamiński</i> , <i>Metamorfozoj</i> de Ovidio en Esperanto	10
Mojose	
<i>Rafał Szempliński</i> , Mia unua E-aranĝo	11
Raportoj, rakontoj	
<i>Janusz Sulżycki</i> , Solece ĉirkaŭ la mondo	12
<i>Lucyna Kowalewska</i> , Verdaj horoj	16
<i>Lucyna Kowalewska</i> , Esperanto forigas lingvajn barojn	17
Pri kio ni aŭdas	
<i>Aleksandra Piaścik</i> , Kontraŭekzantemaj maskoj	18
Homoj	
<i>Krystyna Zgud</i> , Omaĝe al Zuzanna Kawulok	20
<i>Teresa Nemere</i> , Miaj renkontiĝoj kun Zuzanna Kawulok	22
Lingvosciencia angulo	
<i>Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko</i> , Difinilo "La" – bazaj reguloj – parto 1	24
Literaturaĵoj	
<i>Teresa Nemere</i> , Esperantlingva "Sinjoro Tadeo" jam 100-jara	25
Saĝulaj pensoj	
<i>Andreo Bach</i> , Mi ne estas geniulo	27
Leterkesto	
<i>Stenia Romanowicz</i> , Retdepeŝo el Japanio	28
<i>Jagoda Greger</i> , "Esperanto sur strando" en Gdynia	29
<i>Marc Konijnenberg</i> , Fotokonkurso por ĉiuj!	29
<i>Tobiasz Kubisiowski</i> , Fotokonkurso por la jubilea jaro de PEJ	30
Kalendaro	31
Oni eldonis	
Sukceso per Esperanto	32
Forpasis	
Zuzanna Kawulok	33
Waldemar Nowakowski	33
Czesław Biedulski	33
Nia fotogalerio	33

Estimataj legantoj

Tempo rapide pasas. Jam estas printempo kaj majo kun multaj eventoj. Dum tiu ĉi eksterordinara monato, okazis en Pollando kelkaj Esperantaj kunvenoj. La plej granda estis la kongreso de fervojistoj en Wrocław. Bedaŭrinde, samtempe okazis majrendevuo kaj festivalo de Esperantaj kantoj. Ĉeforganizantino de tiuj aranĝoj, kiuj okazis parte en Wrocław kaj parte en Góra, bedaŭris, ke du gravaj aranĝoj okazis samtempe kaj samloke. PEA ne povas ordoni al Internacia Fervjiosta Esperanta Federacio organizi sian aranĝon alitempe. Ili mem elektis la lokon kaj tempon. La organizantoj de la kantfestivalo kaj majrendevuo deklaris, ke iliaj aranĝoj estas ĉefe dediĉitaj al neesperantistoj kaj ne rezignis de ili.

PEA estraro decidis organizi la 37-an Polan Esperanto Kongreson tuj poste. En Zabrze, dum tri tagoj renkontiĝis esperantistoj el Pollando kaj kelkaj eksterlandanoj. La renkontiĝo, kaj turisma programo dediĉita al karbomineja silezia heredaĵo, estis interesa kaj plena de prelegoj kaj ekskursoj. Kiel kutime, okazis ankaŭ deviga ĝenerala kunveno de PEA.

Mi opinias, ke oni devas ŝanĝi formon de la nacia kongreso. Nia movado konstante malfortiĝas. Ni vole ne vole silente akceptas tion. Kial ni eĉ ne provas diskuti, kiamaniere plibonigi nian agadon? Ni devas pensi pri tio kaj komenci malfacilan diskuton pri pola E-movado kaj ĝia organo Pola Esperantisto. Ĉu la nuna formo de la agado estas ŝanaĝebla kaj kiamaniere? Ĉu ni, nuntempaj estraranoj, agantoj aŭ simplaj membroj povas elpensi iun pliefikan manieron de la agado? Ĉu ni scipovas fari tion? Mi ne certas, tamen, ni devas provi, ĉar povos okazi, ke la kandelo de Esperanto, kiun lumigis por ni Ludoviko Zamenhof, post nia aŭ sekva generacio, povos estingiĝi. Eble ni devas observi kaj imiti la agadon de gejunuloj, kiuj ĉiam estas pli modernaj kaj havas freŝajn ideojn. Eble ni diskutu kun eksterlandaj esperantistoj. La translima diskuto povos okazi dum la komuna, pol-germana kongreso, kiun germanaj esperantistoj proponas organizi en la jaro 2020. Ni devas prepariĝi al tia diskuto kaj analizi, kio okazis dum la lastaj jardekoj en nia „pola verda korto”. Nun, mi kore petas, sentu vin respondecaj pri Zamenhofa heredaĵo kaj pensu en liberaj momentoj pri ĝia stato kaj futuro.

Pri la sekva aranĝo - 31-aj Krakovaj Esperanto Tagoj, kiu okazis unu semajno post Pola Esperanto-Kongreso, ni certe skribos en la venonta numero de PE.

Mi kore invitas al la legado. En la nuna numero vi certe trovos interesajn artikolojn

Robert Kamiński

Eventoj

Robert Kamiński

Pri traduko de "Sinjoro Tadeo" en la toruna liceo

Torunaj esperantistoj kunlaboras kun Nikolao Kopernik Liceo, kiu kontinuas tradicion de iama malnova urba gimnazio. Dum la jaroj 1873 - 1879 lernis tie Antoni Grabowski, la fama esperantisto, plej vaste konata kiel tradukanto al Esperanto. Inter multaj diverslingvaj literaturaĵoj li tradukis la faman polan epopeon de Adam Mickiewicz – *Sinjoro Tadeo*. Ĉijare, en februaro, pasis 100 jaroj post la unua eldono de tiu ĉi verko en Esperanto. Uzante la okazon, ke en Toruń gastis Roman Dobrzyński, kiu prelegis en la toruna etnografia muzeo, la muzea edukistino Maria Pokrzywnicka, sciante ke la gasto dum lastaj jaroj okupiĝis pri la fama traduko de A. Grabowski, proponis organizi specialan renkontiĝon kun li en la N. Kopernik Liceo.

La 24-an de aprilo lernantoj plenigis la grandan festsalonon en la lernejo kaj kune kun la direktorino Elżbieta Glura kaj kelkaj instruistinoj, aŭskultis rakontojn de Roman Dobrzyński. La gasto rakontis pri la valora kontribuo de Antoni Grabowski al la universala kulturo, pri lia traduko de la fama pola verko kaj pri sia laboro ĉe redaktado de la esperantlingvaj subskriboj por la filmo de Andrzej Wajda "Pan Tadeusz". Dank' al tio la filmo estis prezentita, en la jaro 2009, por esperantistoj - partoprenantoj de la Universala Kongreso en Bjalistoko.

Menciinda estas la fakto, ke en la lerneja koridoro troviĝas la memortabulo omaĝe al la iama lernanto - Antoni Grabowski, kaj ke ĉijare la lernejo festas la 450-an datrevenon de la fondiĝo. Okaze de tiu evento estas planata aldono sur la lernejan retpaĝon informo pri Antoni Grabowski, pri lia laboro kaj meritoj.



Ankoraŭ pri evento okaze de 100-a mortodatreveno de L. Zamenhof

La 1-an de decembro 2017, okaze de la 100-jara mortdatreveno de L. Zamenhof, festata kiel „Zamenhofa Jaro”, esperantistoj en Szczecin, kune kun la libraro Książnica Pomorska (Pomeria Librejo), organizis renkontiĝon kaj spektaklon por la urba loĝantaro. Halina Biskup, konata en Esperanta movado, interese prezentis la monodramon de Mario Migliuci "Doktoro Esperanto", kiun al la pola lingvo tradukis Roman Dorzyński. La monodramo rakontas pri la vivo kaj agado de Ludoviko Zamenhof.

La prezentado en Szczecin estis jubilea. Jam 50-foje Halina Biskup prezentis ĝin en diversaj lokoj de la tuta lando al esperantistoj kaj al neesperantista publiko. Post la spektaklo, la reprezentatino de la Librejo Bogna Tokarska, dankante al la aktorino, enmanigis al ŝi bukedon da floroj kaj belan foto-albumon. Dum la renkontiĝo ni prezentis ankaŭ ekspozicion pri Esperantaj libroj, gazetoj kaj revuoj. Laŭ opinioj de la partoprenantoj, la spektaklo estis tre interesa kaj la tuta aranĝo sukcesa.

Małgorzata Komarnicka

“Sinjoro Tadeo” en Muzeo de Sinjoro Tadeo en Wrocław

Merkrede, la 10-an de januaro 2018, en la fama *Muzeo de Sinjoro Tadeo* en Wrocław, okazis la renkontiĝo “*Sinjoro Tadeo*” en la lingvo Esperanto. La programon preparis kune: *Eŭropa Centro de Interkultura Edukado (ECEM)* kaj *Muzeo de Sinjoro Tadeo*. La renkontiĝon gvidis Małgorzata Komarnicka. Dum la evento en la librejo de la Muzeo oni povis aĉeti la tradukitan al Esperanto verkon de Adam Mickiewicz.

Lidia Ligęza, konata tradukistino kaj poetino, proksimigis al la publiko la vivon de Ludoviko Zamenhof kaj la tradukon de la epopeo, fare de Antoni Grabowski. Ŝi ankaŭ rakontis pri proceso de la laboro ĉe la plej nova eldono de la epopeo. Małgorzata Komarnicka proksimigis al la publiko la historion de 130 jaroj de la lingvo Esperanto, akcentante ĝiajn plej gravajn momentojn. Ŝi ankaŭ prezentis biografion de Antoni Grabowski kaj lian penigan laboron, kiel tradukanto de „Sinjoro Tadeo”, klarigante malfacilaĵojn, kiujn li devis venki.

La bela kaj neforgesebla akcento de la renkontiĝo estis aŭskultado de kelkaj fragmentoj de *Sinjoro Tadeo*, kiujn pollingve legis per brajlo Wojciech Ławnikowicz, la premiito de la konkurso *Vortbeleco en Esperanto*. Por komparo, en la lingvo Esperanto, la samajn fragmentojn legis Lidia Ligęza.




La librovendejo de la *Muzeo de Sinjoro Tadeo* estos la sola neesperantista loko, kie oni povos aĉeti la epopeon en la lingvo Esperanto. La epopeon oni eldonis dank' al la monsubteno de Universala Esperanto Asocio.

Sekvontage, Lidia kaj Małgosia estis invititaj viziti muzeon kun ĉiĉerono. La Muzeo de Sinjoro Tadeo prezentas verkon de Mickiewicz en ŝanĝita realeco de historia kaj kultura Eŭropo, dum lastaj ducent jaroj. Danke al la plej nova teknologio, kiu estas amika same al la juna kaj maljuna generacioj, en facile komprenebla kaj multaspekta maniero oni prezentas muzeajn kolektojn. Sur la 1500 m² de ekspozicia areo, en 18 ĉambroj, oni kolektis 700 ekspoziciaĵojn, instalis pli ol 100 ludojn, aplikaĵojn kaj plurmediajn prezentojn. Vizitado de la muzeo estas vera plezuro.

Ni kredas ke nia programo plenumis gravan rolon. Atestas tion interesiĝo de la varsovia ĵurnalistino kiu petis nin skribi artikolon pri nia renkontiĝo kaj pri la lingvo Esperanto kiu fakte aperis ĉe la retejo (<http://czytelniczy.pl/pan-tadeusz-w-esperanto/>). La *Muzeo de Sinjoro*

Tadeo kune kun la ECEM preparos aŭtune la sekvan renkontiĝon kaj ekspozicion, pri esperantligvaj eldonoj de “*Sinjoro Tadeo*”.

La organizantoj petas, pruntedoni aŭ donaci la malnovajn ekzemplerojn de “*Sinjoro Tadeo*” en la lingvo Esperanto aŭ informojn pri Antoni Grabowski. La informojn bonvolu sendi al la retadreso: informado.eo@gmail.com aldonante en la temo de la retletero “*Sinjoro Tadeo*”.



Pri la renkontiĝo vi povas ankaŭ legi en pollingva retejo de la muzeo: <https://muzeumpanatadeusza.ossolineum.pl/pl/wydarzenia/pan-tadeusz-w-jezyku-esperanto>

Andrzej Korniluk

Esperanto movado en Bydgoszcz daŭras jam 110 jarojn

En la Vojevodio Pedagogia Biblioteko en Bydgoszcz, la 8-an de majo okazis festa renkontiĝo de la lokaj esperantistoj, okaze de la 110-a datreveno de fondiĝo de la unua Esperanto organizaĵo en Bydgoszcz.

La prezidanto de PEA filio en Bydgoszcz, Jan Skonieczka, feste salutis la ĉeestantojn. Sekve Andrzej Korniluk prezentis historion de la loka Esperanto movado. Inter multaj aliaj agis en Bydgoszcz eminentaj personoj,

konataj en la tuta lando, egzemple: jurnalistoj kaj bibliotekistoj Leopold Kronenberg, kiu jam en la jaro 1923 publikigis en Bydgoszcz la 3-an eldonon de la Esperanto-lernolibro, aŭtoro de famaj E. lernolibroj, prof. Mieczysław Sygnarski, fratoj Edmund kaj Jan Fethke. Post la jaro 1956, aktivadis en la urbo Józef Paweł Bieliński, aŭtoro de Esperanto-lernolibroj kaj specialisto pri instruado. La preleganto rememoris ankaŭ, ke jam komence de la sesdekaj jaroj, sur la kampo de turismo, aktivadis en Bydgoszcz Andrzej Grzębowski, organizanto kaj poste prezidanto de "Monda Turismo" kaj fondinto kaj direktoro de Buroo de Esperanto-Turismo "Esperantotur"- larĝskale aganta turisma E agentejo. Dank al iniciato de A. Grzębowski, dum pli ol 20 jaroj funkciis en Bydgoszcz Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo, kunlaboranta kun la Internacia Akademio de Sciencoj – San Marino, en kiu studis multaj junaj esperantistoj el tre diversaj, ofte tre foraj landoj. Inter la tiutempaj eventoj, tre grava estis laboro de la profesia presejo "Skonpres", gvidata de Jan Skonieczka. "Skonpres" presis praktike ĉiujn E informilojn pri turismo kaj poste eldonadis multajn Esperantajn revuojn kaj librojn, laŭ mendoj de diversaj, ankaŭ ekstelantaj esperantistaj organizaĵoj, i.a. UEA.

Al nia jubileo venis esperantistaj gastoj el Toruń. Ili informis pri la rezulto de la poezia konkurso en Esperanto, okazinta kadre de la festata dum 2017 en Pollando "Jaro de Vistulo". En la konkurso partoprenis aŭtoroj el 8 landoj, ankaŭ, du esperantistinoj el Bydgoszcz: Urszula Tupajka kaj Helena Skonieczka. Niaj reprezentantinoj ricevis premiojn, kiujn, nome de la organizantoj, enmanigis Teresa Nemere.



La jubileon ornamis speciale mendita torta kuko, kun ornamaĵo por tiu ĉi okazo. La renkontiĝo okazis en agrabla etoso kun babilado kaj kun akompana muziko de s-ino Małgorzata Mówińska-Zysk. Ŝi ludis per violono proprajn kaj ankaŭ aliajn, famajn komponaĵojn. La ĉeestantoj povis ankaŭ

rigardi dulingvan volumeton kun ŝiaj poeziaĵoj, tradukitaj al Esperanto de Urszula Tupajka.

Por tiu ĉi okazo en la Biblioteko estis ankaŭ aranĝita ekspozicio pri Esperantaj libroj kaj pri la familio de Ludoviko Zamenhof. Ni kredu, ke la sekvonta jubilea festo estos simile sukcesa.

Robert Kamiński

La 101-a mortdatreveno de la kreinto de Esperanto

Sabate, la 14-an de aprilo 2018, dum la 101-a mortdatreveno de Ludoviko Zamenhof, ĉe la bjalistoka monumento al la majstro, okazis solena renkontiĝo. Venintaj gastoj - loĝantoj kaj lokaj aŭtoritatoj, metis florojn kaj kantis Esperantan himnon *La espero*. La festo estas kutime organizata en la sama loko kaj ci jare ĉeestis ĝin reprezentantoj de la urbestro, provinca kaj urba institucioj de kulturo, junularo kaj esperantistoj el Bjalistoko kaj, ĉijare, ankaŭ el Germanio.

La prezidanto de la Bjalistoka Esperanto-Societo Przemysław Wierzbowski parolis dum la ceremonio: „Zamenhof mortis la 14-an de aprilo 1917, dum la unua mondmilito, en Varsovio, post longa malsano. Ludoviko Zamenhof forpasis, sed ĉiujare ni memorigas al vi, ke ne malaperis liaj ideoj, kiuj li revis realigi. Memoru, ke Zamenhof estis ne nur la kreinto de la internacia lingvo Esperanto. Li de 101 jaroj instigas naciojn por interkompreno kaj rapaciĝo”

Post la ceremonio, partoprenantoj promenis tra Bjalistoko, laŭ la spuroj de Zamenhof kaj Esperanto.



Florj de prezidento de Bjalistoko al L. Zamenhof

Pri Oomoto en muzeo

Laŭ iniciato de la eduka fako de Etnografia Muzeo en Toruń, gvidata de la esperantistino

Maria Pokrzywnicka, ĉijare, la 23-an de aprilo, en la Muzeo okazis tre interesa aranĝo *Rakontoj el Oomoto pri japana religio de paco, pri virina spirita gvidado kaj pri aikido*.

En la unua parto de la aranĝo la pola esperantisto Roman Dobrzyński prezentis sian esperantlingvan filmon *Japana printempo* kaj rakontis pri sia 3-monata restado en Kameoka - la kulturcentro de Oomoto, kie li interkompreniĝis en la internacia lingvo kaj verkis la libron *Rakontoj el Oomoto*. La paca religia movado Oomoto kreskis en Japanio fine de la 19-a jarcento, surbaze de la plej malnova japana religio - ŝintoismo. La movado, dum la intermilita tempo, akceptis Esperanton kiel pacan lingvon por sia agado. Multaj oomotanoj konas kaj uzas la internacian lingvon Dum Universalaj Kongresoj de Esperanto ili prezentants sian ideon kaj, bjam tradicie, japanan te-ceremonion. Alia interesa kulturfenomeno estas tio, ke la movadon, ek de komenco, gvidas virinoj..



Tre interesa estis ankaŭ la dua parto de tiu ĉi muzea aranĝo - prezento de la specifa, senperforta luktado aikido, kiun inventis kaj kreis la oomotano Morihei Ueshiba. La aikido arton de luktado prezentis infanoj, junuloj kaj plenkreskuloj el Toruna Asocio -

Harmonio de Korpo kaj Menso. La prezentadon preparis Sensei Waldemar Giersz 5 dan Aiki - kaj el Pollando.

La organizantoj speciale dankas ankaŭ al la oomotano Toŝiomi Okuŭaki el Kameoka, kiu okaze de la aranĝo sendis al la Muzeo informajn filmojn kaj libron pri Oomoto.

Metamorfozoj de Ovidio en Esperanto

La 23-an de marto 2018, en la Etnografia Muzeo en Toruń okazis *Internacia Tago pri Metamorfozoj de Ovidio*, kadre de *Festval Europeen Latin Grec*, iniciatita de la franca universitato en Lyon. En Toruń la aranĝon organizis la fondaĵo „Traditio Europae”, kunlaboranta kun Filologia Fakto de Nikolao Kopernik Universitato en Toruń kaj kun aliaj lokaj kulturaj institucioj.

La Muzeo gastigis la aranĝon jam duan fojon. En la jaro 2017, okazis voĉlegado de la homera *Odiseado*. Ĉijare, okaze de la 2000-a datreveno de la morto de Ovidio, estis elektita lia fama verko *Metamorfozoj*. La studenta teatro „Status quo” prezentis teatraĵon pri historio de Piramo kaj Thisbe el la 4. Libro de *Metamorfozoj*. Post la spektaklo, la elektitajn partojn de la verko voĉlegis en diversaj lingvoj filologoj kaj studentoj el la Universitato kaj ankaŭ lernantoj de la toruna Akademia Gimnazio. Aŭdeblis: latina,



germana, greka, nederlanda, franca, ĉeĥa, rusa, itala, hispana, pola, portugala, bulgara, angla, ĉina kaj Esperanto. En Esperanto ankaŭ ĉijare voĉlegis **Maria Pokrzywnicka** - muzea edukistino kaj esperantistino. Poste volontuloj el publiko laŭtlegis fragmentojn en la pola lingvo, tradukitaj de Anna Kamieńska.

La fragmenton pri historio de Piramo kaj Thisbe el la latina lingvo esperantigis D-ro Henri Vallienne. Ĝi estis publikigita en “La Revuo”, II, 1907-1908, p.32-34. La fonton afable indikis s-ro Antonio De Salvo (kontakto per blogo): <http://www.bitoteko.it/esperanto-vivo/eo/tag/antonio-de-salvo/>

Mi ankoraŭfoje dankas al aŭtoro de la blogo.

La materialon pri la evento bonvolu rigardi:

<http://etnomuzeum.pl/filmy/metamorfozy-owidiusza-w-15-jezykach/>

<https://pl-pl.facebook.com/traditioeuropae/>

www.traditio-europae.org

La organizantoj planas denove renkontiĝi en la sekvonta jaro, por legi diverslingve alian antikvan verkon. La *Festivalo* estas bona okazo por

esperantistoj en diversaj lokoj, kie agas universitatoj, por kontaktiĝi kun filologiaj fakoj kaj enplekti en programon ankaŭ Esperantan version de la legota verko. Tiamaniere eblas montri_utilecon de la internacia lingvo sur la literatura kampo en la faka, universitata medio.

Mojose

Kun ĝojo ni ricevis raportojn de komencantoj pri iliaj travivaĵoj kun Esperanto. Nun ni aperigas ĉiujn tri.

Redakcio

Rafał Szempliński,

Mia unua E-aranĝo

Internacia Junulara Festivalo de la 28.03.2018 ĝis la 03.04.2018 en Marina di Ascea, Italio.

Mi veturis al Neapolo matene la 29-an de marto. Mi jam estis tie je la 10-a. Mi prenis trajnon al Ascea kaj alvenis al Ascea ĉ. La 12-a. Hazarde, en la stacidomo, mi rekontis ĉeĥajn esperantistojn, Bonŝance por ili aŭtobusetoj, kiu portis fine ankaŭ min al la IJF-ejo. Kun ili mi havis la unuajn Esperantajn parolojn - Estis timige. Fakte, komence estis por mi ĝenerale malfacile malsteĉiĝi kaj ekparoli, ĉar mi ankoraŭ „en la reala” vivo ne uzis Esperanton, kaj mi ne komprenis multajn esperantaĵojn. Ĝis la fino de la semajno, mi tamen tute malstreĉiĝis kaj laŭ mi sukcesis gvidi kelkajn konversaciojn. Surloke mi akceptiĝis kaj elpakis en mia ĉambro. La unua tagon, je la 18:00 ĝis la 19:30 estis E-kurso en A2-nivelo, kiun mi partoprenis. Poste ni vespermanĝis. Estis interese vidi, kiel italoj kutime vespermanĝas: 3, tre belaj pladoj. La lasta plado estis ĉiam deserto aŭ fruktoj. Tium tagon vespere okazis kantado. Mi partoprenis nur la komencon, ĉar mi estis tro laca kaj mi frue iris dormi.

La sekvan tagon matene mi iris al la maro, ĉar ni estis tre proksime al ĝi. Mi promenis, plaĝumis, naĝetis kaj ni ankaŭ pilkludis. Kompreneble, estis belega suno kaj varmo. Post la manĝo, mi estadis en la trinkejo kaj gufujo kaj provis paroli kun la aliaj. De la 18-a ĝis la 19:30 mi denove havis E-kurson. Venis la vespermanĝo, kaj la trinkomanĝa nokto. Tio estis ege interesa sperto. Mi staris ĉe la pola tablo kaj reprezentis Pollandon. Ni

havas kolbasetojn „kabanosy” kaj vodkon Soplica, en 2 diversaj gustoj. La homoj ĉion formaĝis kaj fortrinkis. Poste, mi iris festi kun la aliaj kaj dancis ĝis la 4-a matene. Mi ekkonis labambumadon kaj kelkajn Esperantajn kantojn. La sekvan tagon tamen mi devis tre frue vekiĝis, ĉar mi partoprenis la unutagan ekskurson la Capo Palinuro.

Ĝi estas belega duoninsulo, kies naturajn miraklojn ni povis admiri. Ni nur revenis por vespermanĝo, kaj mortlace mi falis en la litojn. La sekvan tagon mi devis eĉ pli frue vekiĝi, ĉar mi malfermis la matenmanĝejon, mi organizis la matenmanĝon kaj mi devis esti tie tuttempe por pretigi kafon kaj helpadi. Post la matenmanĝo, mi iris al la duontaga ekskurso al la praromia urbo Paestum. Tio estas ruinaĵo de la malnova, romia urbo. La rakontoj de la geĉiĉeronoj estis tre interesaj. Mi multe eksciis. La loko mem estis belega. Poste mi revenis kaj ni havis malfruan tagmanĝon. Pro tio, la tuta programo prokrastiĝis. Mi partoprenis posttagmeze kelkajn prelegojn, vespermanĝis kaj restis dum iom da tempo paroli en la gufujo. Venis la dua tago de aprilo. Matene, mi denove iris al la maro ĝui la sunon (dum la ekskurstagaj estis malpli bona vetero). Post la tagmanĝo, mi iris al du prelegoj, kaj poste partoprenis la E-kurson. Poste mi festis denove, ĝis la 4-a, en la E-diskejo. Venis la lasta tago de la IJF. Tamen, mi restis ankoraŭ en la IJF-ejo, ĝis la 4-a horo, do mi multe helpis purigi kaj ordigi al la organizatoj. La 4-an de majo, posttagmeze mi iris al Neapolo, kaj mi tie pasigis 1 nokton kaj poste reflugis al Varsovio. Mirinda vojaĝo. Mi vere dankas pro la ebleco.:

Raportoj, rakontoj


Janusz Sulżycki

Solece ĉirkaŭ la mondo

“Se ni vere volas ion atingi kaj strebas tiucele, tiam laŭrokrono de la venko certe al ni apartenos”. (L.Teliga)

Ni citas eldirin de Leonid Teliga (1917-1970), kiu naskiĝis preskaŭ samtage kiel John Kennedy kaj estis ankaŭ entuziasmulo de mar-velado. Antaŭ 50 jaroj li solece navigadis ĉirkaŭ la mondo kaj surmare luktis kontraŭ mortiga malsano. Ekde sia infnaĝo, Leonid ŝatis legi librojn pri mar-veturistoj kaj velboatoj. Antaŭ la 2-a mondmilito li volis studi medicinon, sed ne havis

monon por tio. Sekve li partoprenis kurson pri velado en la balta haveno Jastarnia kaj ricevis diplomon de mara stiristo.



Penritra portreto: La velmaristo sur la storma maro.



Teliga dum la 2-a mondmilito en pilota uniformo


Kiam Germanujo eksplodigis la 2-an mondmiliton, Teliga estis oficiro kaj dum la tagoj 6-a kaj 7-a de septembro 1939, lia taĉmento batalis kontraŭ la agresantoj apud la urbo Tomaszów Mazowiecki. Tiam li estis vundita kaj kun la tuta taĉmento translokiĝis orienten al la regiono de Wołyń. Ankoraŭ dum la milito, Leonid finis unujaran kurson por ŝipestroj kaj laboris kiel fiŝkaptisto en la Krimea Duoninsulo, flosigis ŝipojn sur la rivero Don, poste en Nigra kaj Azova Maroj. En 1942, li aliĝis al Pola Armeo en Sovetunio, foriris al Britujo kaj tie oni lin direktis al Aviadila Eskadro 303, ĉar li estas spertulo pri navigado. Post la milito, Teliga revenis al Pollando kaj laboris kiel ĵurnalisto, aktoro kaj tradukisto. Poste li translokiĝis al Gdanska Marbordo kaj ricevis la postenon de instruitoro pri marvelado en Gdynia Vel-klubo „Gryf”. Tie li povis plene realigi sian pasion pri velado kaj uzis multajn okazojn por partopreni en marveturoj sur fiŝkaptistaj ŝipoj kaj verki artikolojn.

Venis la tempo, en kiu li decidis realigi sian grandan revon: solece ĉirkaŭveturi la Teron sur velboato. Tiucele Leonid vendis sian loĝejon, komencis konstrui la boaton kaj nomis ĝin “Opty”. La boato estis preskaŭ

10 metrojn longa, 2.75 m larĝa, pezis 5 tunojn kaj havis grandan ujon por 200 litroj da drinkebla akvo.



La granda aventuro komenciĝis en januaro 1967 kaj daŭris pli ol du jarojn, ĉar li mem devis ripari sian boaton en diversaj havenoj. Multaj gazetoj publikigis artikolojn pri tiu vojaĝo kaj survoje Teliga ricevis honoran membrecon en velistaj markluboĵ preskaŭ en ĉiuj havenoj, kie li haltis. Sed tiu longa marveturo postulis konstantan lukton kontraŭ ventegoj kaj marondoĵ. Tio elĉerpas fortojn de ĉiu velmaristo. Aldone, atakis lin danĝera kancer-malsano. Malgraŭ ĉio, Teliga decidis daŭrigi la ĉirkaŭnavigadon. En julio 1968 li haltis sur la insulo Fiĝi kaj ekde tiam oni perdis kun li kontakton. En sekvaj 165 tagoj li veladis senhalte 13,260 marmejloj (= preskaŭ 25,000 km). Tio estis la monda rekordo.



En aprilo 1969 Leonid Teliga alvenis al Kanariaj Insuloj kaj fermis la ĉirkaŭteran cirkolon de sia vojaĝo. Oni tuj veturigis la malsanan mariston al hospitalo en Varsovio, sed la malsano jam tre disvolviĝis. En tia situacio, nek la kuracistoj, nek kirurgia operacio povis lin helpi. La velmaristo vivis jam nur unu jaron.

Kovrilo de la libro "Soleca navigado sur Opty"





En haveno Gdynia staras monumento al Leonid Teliga

Leonid Teliga postlasis 30 librojn, tradukitaj al kelkaj lingvoj, krome multajn rakontojn, poemojn kaj radioprogramojn. La plej konata lia verko estas “Soleca navigado sur *“Opty”* – la libro, en kiu li bele priskribas la plej grandan aventuron de sia vivo. Anstataŭ veturi rapide de insulo al insulo, li decidis pasigi pli longan tempon en unu loko por konatiĝi pli bone kun la loka naturo kaj kun homoj tie loĝantaj. Haltinte en Karaiba Insularo, la aŭtoro interparolis kun piloto, kiu posedis aviadilon kaj laboris por agrikulturo de Sainte-Lucie. La piloto flugis *kelkfoje* en unu

tago, tre proksime al arbopintoj, kaj ŝprucis insekticidojn, super ĉiu bananplantejo. Nur malmultaj scias pri tio, kiam aĉetas ekzotikajn fruktojn, ĉu ne?

Tiaj kaj eĉ pli agrablaj rakontoj abundas sur la paĝoj verkitaj antaŭ kvindek jaroj, sed interesaj ankaŭ por la nuntempaj legantoj.

Honore al li, la velboata farejo en pola havenurbo Szczecin la, ricevis lian nomon.



Koverta FDC kaj poŝtmarko eldonita memore pri ĉirkaŭnavigado de L. Teliga

Li skribis en unu el siaj leteroj:

“Mi forkuris al maro, por eniri tiun realecon, kiu donas spicon al la vivo: per pipro de danĝeroj, salo de mar-akvo, peno de la muskoloj, kun vasta spaco por la okuloj kaj animo”.

La artikolo ankaŭ legeblas ĉe retejo: <https://familiaro.com/solece-cirkau-la-mondo>

Verdaj horoj

Lunde, la 26-an de februaro, en Wrocław, en la sidejo de Eŭropa Centro de Interkultura Edukado iniciate de Małgosia Komarnicka okazis inaŭguro de la nova programo de tiu organizaĵo, sub la komuna titolo *Verdaj Horoj*. Tiaj renkontiĝo okazos ĉiun trian lundon de monato. La celo de la programo estas stimuli aktivecon kaj vigligi la kunlaboron kun neesperantistaj medioj kaj disvastigi Esperanton.

La ciklon malfermis Halina Kuropatnicka-Salamon, poetino, membro de la Asocio de Polaj Literaturistoj, brajlistino kaj, antaŭ ĉio, esperantistino. Dum la renkontiĝo la publiko havis eblecon aŭskulti poeziaĵojn plenajn de “printempa ĝojo”, kiujn la aŭtorino mem legis. Tamen, la plej granda surprizo estis brajlaj dedikaĵoj de la aŭtorino skribitaj en poeziaj volumetoj.

Bela kaj unika akcento de la renkontiĝo estis ankaŭ aŭskultado de poeziaĵoj de Elżbieta Karbowska kaj Halina Krakowska, la studentinoj de E-kurso, gvidata de Małgosia Komarnicka. La aŭtorinoj en siaj poeziaĵoj konvinkadis la aŭskultantojn pri profitoj, kiujn ni gajnas lernante la lingvon Esperanto.

Fine de la renkontiĝo, la publiko povis admiri pasian dancon de la reprezentantinoj de la danca grupo “Gracja” el Wrocław.

La publiko estis ravita de la neforgesebla etoso de la renkontiĝo, ĉar ĝi estis escepte familia kaj favoris bonan babiladon pri kaj en Esperanto. Parton de la publiko kreis studentinoj de E-kursoj, kiuj invitis siajn amikojn. Dum tiu belega vespero eblis aŭskulti E-muzikon kaj gustumi bongustajn, hejmfaritajn kukojn, dolĉaĵojn, kafon kaj teon.



La Eŭropa Centro de Interkultura Edukado komencis la novan serion de la renkontiĝoj kun neesperantistoj tiel viglaritme kaj agrable, ke neniu deziris reveni hejmen.

Ni jam tre kore invitas vin veni al Vroclavo al niaj sekvaj *Verdaj Horoj* fine de marto. Detalaj informoj ĉe: informado.eo@gmail.com kaj: www.ecem.com.pl].

Lucyna Kowalewska

Esperanto forigas lingvajn barojn

Mi estas studentino de la Esperanto-kurso, kiun gvidas Małgosia Komarnicka en Vroclavo. Ŝi, instruante nin, rakontas al ni ankaŭ pri Esperanto-movado kaj de tempo al tempo invitas esperantistojn-eksterlandanojn, por ke ni, dum la kurso, provu paroli kun ili. Ŝi ankaŭ preparis ekskurson al Budapeŝto, por ke ni konvinkiĝu, ke valoras koni Esperanton.

Post du hora malfruiĝo, ok persona grupo alvenis al la ĉefurbo de Hungario. Atendis nin, malgraŭ malfruiĝo, du ĉarmaj esperantistinoj: Éva Baloghné Fodor kaj Anna Besenyei. La saman tagon, ni jam komencis viziti la urbon per ŝipo, admirante bele lumigitajn konstruaĵojn ambaŭflanke de la rivero Danubo. Tiu ŝipvojaĝo alportis al ni neforgeseblajn impresojn. Ni estis ravitaj de belaj vidaĵoj.

Sekvan tagon matene, kun Anna ni vizitis historiajn restaĵojn de Buda kaj posttagmeze, jam kun Eva, ni dancis kaj trinkis teon kun esperantistoj en Peŝto. Budapeŝto estas la unuiĝo de tri urboj: Pest, Buda kaj Óbuda.

Eva instruas ne nur Esperanton, sed ankaŭ dancon kaj, dank' al tio, ni povis ekkoni kaj lerni specialajn dancojn por pliaĝuloj. Kun la granda plezuro ni admiris bele dancantajn hungarajn pliaĝulojn kaj, fine de tiu "danca renkontiĝo", la reprezentantinoj de la vroclava dancgrupo *Gracie* prezentis sian dancaranĝon de la furorkanto *Despasito*, elvokante aplaŭdon.

En Esperanto-Klubo atendis nin lokaj esperantistoj kaj ni povis konvinkiĝi, kiel utila estas lingvokono de Esperanto. Kompreneble, ni komence timis paroli, sed iom post iom ni progresis. Dank' al Esperanto ni sentis nin, kiel en bona familio.

La sekvan tagon, ni vizitis kelkajn gravajn objektojn de Peŝto, admirante la historian scion de nia ĉiĉeronino Anna.

Dum nia mallonga, tri taga restado en Budapeŝto, ni havis ankaŭ eblecon provi bongustajn hungarajn manĝaĵojn...



Ni revenis Pollandon feliĉaj, tenante en niaj koroj belegajn momentojn, kiujn ni pasigis en Budapeŝto dank' al Małgosia, Éva kaj Anna.

Tiu unua eksterlanda ekskurso kun Esperanto aldonis al ni kuraĝon kaj deziron viziti aliajn lokojn pere de Esperanto. Julie ni, probable, vizitos la germanan urbeton Herzberg am Harz – *die Esperanto-Stadt*, al kiu invitis nin reprezentantoj de Interkultura Centro Herzberg - Zsófia Kóródy kaj Petro Zilvar.

Pri kio ni aŭdas

Aleksandra Piaścik
Nieznany Świat 4/2018

Kontraŭekzantemaj maskoj

Ĉiuj ekzantemoj, precipe makulaj, papulaj, eritemaj kaj foliklaj estas la rezulto de virusaj infektoj, kaj aliaj momentaj haŭto incitoj, ekz. alergio, vermoj, troaj hormonoj en la korpo, virusaj infektoj (varioleto, zostero) aŭ bakteriaj infektoj (ekz. skarлата febro). Ili signas la aperon de: diabeto,

kanceroj, manko de imuneco kaj subnutrado. Ili signas gravan sanan danĝeron. Kiam ili aperas, vi devas konsulti rapide vian kuraciston. En ĉi tiu artikolo, ni rekomendas kelkajn hejmajn rimedojn por malpezigi doloron kaj pikadon, kiuj ĉiam akompanas ĉi tiujn malsanojn. Ĉi tiuj metodoj estas malmultekostaj, facilaj por prepari kaj apliki, kaj kiam oni praktikas ilin regule, ili rapide helpas

Turmento de adoleskantoj

Akno okazas dum pubereco. 65% da homoj suferas ĝin dum adoleskaĝo. Kelkfoje ĝi restas konstante, precipe ĉe homoj kun grasa haŭto. Valoras rekomendi jenajn manierojn por solvi tiun ĉi malfacilaĵon.

- Masko de cepo - miksu cepon, tranĉitan je etaj pecetoj, kun kulereto da avena brano kaj kulereto da mielo. Metu sur vizaĝon vespere, por 20 min.

- Lakto-avena masko - boligu en la malgranda kvanto da akvo du kulerojn da acida brasiko kaj kuleron da avenflokoj. Metu la maskon sur vian vizaĝon por 20 minutoj, poste forlavu ĝin.

- Krena masko - miksu kvar kulerojn da raspita kreno kun du kuleroj da lakto. La miksaĵon disvastigu sur la vizaĝo. Lavu post 20 minutoj.

- Aliza masko - plenmanon da disrompitaj alizoj-fruktoj miksu kun kulero da mielo. Disŝmiru sur via vizaĝo. Lavu post duonhoro.

- Gista masko - gistan globeton je la grandeco de ping-pong pilko surverŝu per iom da varma akvo kaj miksu kun kulero da citrona suko. Disŝmiru la miksaĵon sur la vizaĝo kaj kovru per gazo. Lavu post 30 minutoj.

- Brasika masko - Miksu du kulerojn da acida brasiko kun kulero da avenflokoj. Metu la maskon sur vian vizaĝon por 20 minutoj, poste lavu ĝin.

- Lakto-avena masko - boligu en la malgranda kvanto da akvo du kulerojn da avenaflokoj kaj aldonu kuleron da varma lakto. Metu la miksaĵon sur vizaĝon. Post 20 minutoj, forlavu ĝin.

Atenton! Por forigi la vizaĝajn maskoj, valoras uzi tonikojn, precipe naturajn. Krom akvo, ili enhavas, inter alie, plantajn ekstraktojn, oleojn kaj vitaminojn. Ĉiu toniko estas destinita por alia tipo de haŭto, ekzemple grasa, matura aŭ seka.

En la sekva parto hejma preparado de tonikoj.



Omaĝe al Zuzanna Kawulok

La 1-an de aprilo 2018, forpasis Zuzanna Kawulok, larĝe konata, estimata kaj tre ŝatata en sia regiono, montaranino de Silezia Beskido kaj esperantistino. Pro sia aktiveco en popularigo de la beskida folkloro kaj kulturo ŝi ricevis multe da oficialaj premioj, inter aliaj: Oskar Kolberg

Premion (1991), premion de Ministro pri Kulturo (2003) kaj, en la jaro 2009, la premion „Gloria Artist”.

Zuzanna Kawulok naskiĝis la 24-an de aprilo 1938, en Istebna, vilaĝo situanta en la plej bela parto de Silezia Beskido, kiel filino de Jan kaj Franciszka Kawulok. Ŝi travivis, kiel ŝi mem diris, tre belan, intensan kaj koloran vivon. De sia patro, Jan Kawulok, tre konata multinstrumentalisto kaj populariganto de kulturo de la montaranoj, ŝi eklernis ludi je diversaj popolaj instrumentoj, ŝi estis la unua virino en la regiono, kiu ludis violonon. Zuzanna ankaŭ



dancis kaj poste ludis en la folkloro ensemblo „Koniaków”, verkis poemojn kaj rakontojn pri vivo de montaranoj. Dum multaj jaroj, en sia ligna, senkamena naskiĝdomo, ŝanĝita je muzeo, ŝi rakontadis pri la iama vivo de montaranoj. Tio interesis ne nur turistojn, sed ankaŭ turistgvidantojn, kiuj venigis tien multajn turistgrupojn. Zuzanna amis muzikon, montojn, arbarojn, vilaĝon, respektis vivkutimojn, kaj volis, ke ĉiuj ankaŭ ekkonu kaj ekamu tion ĉion, simile kiel ŝi.

Esperanton ŝi ekkonis, kiam post Universala Kongreso en Varsovio, en la jaro 1959, vizitis ŝin kelkaj esperantistoj. Tre plaĉis al ŝi la ideo de Esperanto, lingvo, kiu donas eblecon de interkompreniĝo en la tuta mondo. Ŝi eklernis tiun lingvon mem, kaj tuj poste komencis partopreni en Esperantaj kongresoj, kunvenoj kaj aliaj aranĝoj en diversaj landoj de Europo. Grava kaj interesa estis Tamen, la plej simpatie ŝi rememoris la universalan kongreson en Ŝtokholmo, kiam por amase kolektiĝinta kongresaro, sur la granda scenejo, ŝi ne nur ludis diversajn paŝtistajn instrumentojn, sed mem komentis la muzikon kaj devis ripeti la ludadon kelkfoje. Pri tio poste, ŝi mem diris: „ankaŭ al mi plaĉis”.

En lastaj jaroj ŝi jam estis malsana, ne povis vojaĝi, Tamen, Zuzanna sidante en rulseĝo daŭre estis aktiva. *(Czy to jest potrzebne?)*. Verkis novajn poemojn, ordigis malnovajn kaj en ĉiuj okupoj oni povas vidi ŝian amon al muziko kaj montoj.

La 5-an de aprilo okazis enterigo de Zuzanna Kawulok, en kiu partoprenis amaso da homoj - amikoj, konatoj, vilaĝanoj, folkloro ensemblo, tre granda grupo de beskidaj turistgvidantoj kaj, kompreneble, ni, esperantistoj. Komence la adiaŭo okazis en la malnova domo de Zuzanna, en kiu jam de jaroj funkcias folkloro muzeo kiun ŝi gvidis kaj pri kiu zorgis. Inter aliaj, por la diaŭo, venis sufiĉe granda grupo de homoj, vestitaj en ruĝaj jakoj kio iom ŝokis la ĉeestantojn. Ili estis turistgvidantoj, kiuj venis en oficialaj vestoj kun la emblemo „Beskida Ĉiĉerono” sur brusto. Sekvis la lasta vojo de la kabano al la protestanta preĝejo kaj poste al tombejo. Adiaŭe ludis muzikistoj, vestitaj en folkloraj vestoj. Ili ludis montaranan muzikon, kiun ŝi ĉiam plej amis.



En mia urbo Bielsko-Biała, situanta ankaŭ apud Beskidy Montaro, estas sufiĉe vigla grupo de esperantistoj. Kiam iu el ni gastis esperantistajn amikojn, el eksterlando aŭ el malproksima parto de Pollando, ni ĉiam klopodis kun ili vojaĝi laŭ la tiel nomata „Beskida Nodo, por admiri belegajn montarajn pejzaĝojn kaj, kompreneble, en Istebna viziti Zuzanna Kawulok. Ŝi ĉiam tre agrable akceptis nin. Nun certe ni agos simile, folkloro muzeo en Istebna ja estas, sed ne estas jam ĝia bona animo – la dommastrino Zuzanna. Kaj tio jam ne estos same.

Miaj renkontiĝoj kun Zuzanna Kawulok

Ĉu vi renkontis multajn homojn, kun kiuj renkontiĝoj ĉiam estis ne nur agrablaj, interesaj, sed ankaŭ riĉigaj, pensiigaj? Mi havis feliĉon renkontiĝi kun Zuzanna Kawulok.

Komence de la sepdekaj jaroj de la pasinta jarcento, kun grupo de turistoj mi vizitis la vilaĝon Istebna en la Silezia Beskido. Post la vizito en la malnova, ligna kabano, ĝis hodiaŭ funkcia kiel muzea ekspozicio, kie la iama ĝia loĝanto kaj posedanto Jan Kawulok, rakontadis pri vivkondiĉoj kaj kutimoj de la regionaj montaranoj, sur benko, antaŭ la kabano, ni rimarkis junan virinon, en la modesta, regiona vesto, kiu ludis violonon. Oni informis nin, ke ŝi estas filino de la dommastro. Impresis nin ĉiujn ŝia muzikado kaj ankaŭ agrabla, delikata rideto. Videblis, ke ŝi ŝatas la okupon. Post jaroj mi eksciis, ke la renkontita violistino estis la unua virino en la regiono, kiu ludis tiun instrumenton. Ĝis kiam ŝi eklernis tiun arton, violonoj ludis nur viroj. Tiutempe, ŝi ofte riĉigis rakontojn de sia patro, prezentante por turistoj ankaŭ aliajn regionajn muzikinstrumentojn. Tia estis mia unua renkontiĝo kun Zuzanna Kawulok. Mi tiam ne sciis, ke iam ni amikiĝos.

La dua renkontiĝo okazis eksterlande. En la jaro 1977, la etnografia muzeo en Toruń, en kiu mi laboris, aranĝis en la germana Vajmaro ekspozicion de la pola popola skulptoarto: "Nikolao Kopernik en la pola popola skulptoarto".

Tio estis jam dua tia ekspozicio en tiutempa Germanio, laŭ miaj spertoj el Berlino, mi proponis al germanaj esperantistoj specialan renkontiĝon en la muzeo, kie okazis la ekspozicio, proponante esperantlinvan prelegon pri la skulptoarto kaj ĉiĉeronadon en ekspozicio en Esperanto. La lokaj esperantistoj akceptis la proponon kaj ekplanis grandan renkontiĝon por esperantistoj el la tuta regiono, Tiam, tute hazarde, mi eksciis, ke Zuzanna Kawulok estas esperantistino. Imagu, kiel mi ĝojis, kiam okazis, ke ŝi kaj ankaŭ la germanaj organizantoj konsentis plilarĝigi la kunvenon je prezento de la pola, montarana muziko. Nur jam en trajno evidentiĝis, ke Zuzanna flue parolas Esperanton. Jam komence de tiu renkontiĝo ni ambaŭ eksentis iuspecan reciprokajn simpatiojn. La parto de ŝia programo (Zuzanna prezentis kelkajn montarajn muzikilojn kaj priparolis kelkajn elementojn de sia regiona vesto) surprizis la ĉeestantojn kaj kaŭzis entuziasman aplaŭdon, La interesiĝo estis pli granda ol ni ambaŭ supozis. Havante 3 tagojn por viziti la urbon, kompreneble kun esperantistaj akompanantoj, ni sukcesis amikiĝi.

La tria, tre interesa renkontiĝo, okazis en Stokholmo, dum la 65-a

Universa Kongreso. Tie Zuzanna prezentis, sur la granda scenejo, por amase kolektiĝintaj gekongresanoj, diversajn montaranajn muzikinstrumentojn: ŝi majstre ludis violonon, sakfluton, diversajn ŝalmetojn kaj flutojn, kornon kaj ankaŭ, preskaŭ ŝokigante la publikon, longegan paŝtistan trumpeton (sur la scenejo helpis ĝin teni surbrake mia filino, tiutempe 12-jara). Rakontante en korekta Esperanto pri la montaranaj kutimoj, kuraĝe kaj bonhumore Zuzanna montris sian longegan ruĝan, ŝtrumpon; unu el tiuj, kiujn iam uzis la montaraninoj, faldante tiajn lanaj ŝtrupojn sur piedoj, por defendi sin kontraŭ la malseka neĝo. La rakonto, kompreneble, ekspodigis laŭtan ridon de la publiko. Tiamaniere la pola montaranino scipovis informi kaj amuzigi la kongresanojn. Rememorigante la delikatan, malkuraĝan rideton de Zuzanna, dum mia restado antaŭ jaroj en Istebna, en Stokholmo mi duoble ĝojis – pro ŝia sukceso en Esperantujo kaj pro tio, ke mi konas ŝin.

Sekvis kelkaj renkontiĝoj en Toruń, en nia etnografia muzeo. Ĝis hodiaŭ multaj personoj en nia urbo memoras solistajn prezentiĝojn de la montaranino, sur la muzea scenejo, precipe ŝian elpaŝon dum unu el niaj plej grandaj muzeaj aranĝoj, dum la *7-a Internacia Renkontiĝo de Popolaj Orkestroj kun uzo de Esperanto kiel pontlingvo*. Krom tio, Zuzanna kelkfoje venigis al Toruń infanan folklorgrupon el sia regiono, kiun ŝi organizis kaj al kiu ŝi instruis Esperanton. La infanoj havis eblecon prezentiĝi en la muzeo praktiki uzon de la internacia

lingvo kaj samtempe lerni historion de sia lando. Mi devas ankaŭ menci, ke Zuzanna, restante en Toruń, kutimis viziti mian patrinon, tiutempe jam pro malsanono ne povanta eliri el la loĝejo. Tiuj vizitoj kun muzikado kaj rakontado estis por mia panjo granda ĝojo kaj por mi atesto pri la bonkoro kaj amikemo de nia gasto.



Dum multaj jaroj Zuzanna estis malsana. La kruela reumasismo unue malebligis al ŝi muziki kaj poste devigis uzi rulseĝon. Ŝi do ne scipovis ankaŭ vojaĝi. La lastajn jarojn, pro la kruelaj rezultoj de la sukera diabeto, ŝi estis entude dependa de la priservo de aliaj homoj. Ŝi suferis, sed mi ne aŭdis, ke ŝi plendas. Dum nia lasta, telefona interparolo, ŝi diris: "estis tre malfacile, sed nun jam estas pli bone. Hodiaŭ mi povas rigardi tra fenestro malrapide falantajn blankajn neĝerojn kaj mi estas feliĉa, ke mi povas ĝui tion...".

Mi tre ĝojas kaj fieras, ke mi konis tiun eminentan montaranan muzikistinon, entuziasman esperantistinon, kaj, antaŭ ĉio, la homon, kiu ne plendis. Dank' al Zuzanna Kawulok, la blankaj neĝeroj ĉiam estos por mi belaj kaj ĝojigaj.

Difinilo¹ „La” – bazaj reguloj – parto 2

La – individuaĵoj

Kiam temas pri individuaĵoj (ne pri speco), *la* signifas, ke la parolanto supozas, ke la alparolato konas la aferon. *La* tiam signifas pli-malpli “vi scias, pri kiu(j) mi parolas”.

Foresto de *la* (aŭ alia difinilo) signifas, ke la parolanto supozas, ke la alparolato ne konas la aferon. Manko de difinilo signifas pli-malpli “vi ne scias, pri kiu(j) mi parolas”. Manko de difinilo povas ankaŭ signifi, ke la identeco ne gravas.

Neuzo de *la* estas do same grava kiel uzo de *la*.

Ekzemploj

- **La rozo apartenas al Teodoro.** La parolanto supozas, ke la aŭskultanto povas kompreni, pri kiu rozo temas.

- **Al Teodoro apartenas rozo.** Nun temas pri rozo, kiun la aŭskultanto ne konas.

- **La infanoj kolektis florojn.** La aŭskultanto ne scias, pri kiuj individuaj floroj temas.

- **La infanoj kolektis la florojn.** Ili kolektis tiujn florojn, kiujn la aŭskultanto konas.

- **Infano ploras.** Iu nekonata infano ploras.

- **La infano jam ne ploras.** La parolanto supozas, ke la aŭskultanto komprenos, kiu infano estas. *La infano* estas kvazaŭ okaza propra nomo de certa konata infano.

- **Donu al la birdoj akvon, ĉar ili volas trinki.** Oni parolas pri konata grupo de birdoj.

- **Domo brulas!** Individua domo brulas, sed la parolanto ne estas certa, ĉu la aŭskultanto scias, pri kiu domo temas.

- **La domo brulas!** La parolanto volas informi, ke nun brulas tiu certa domo, kiun la aŭskultanto supozeble konas (eble lia hejmo).

¹ Difiniloj estas specialaj vortoj, kiujn oni metas antaŭ O-vorta frazparto por difini la identecon de la afero.

- Dum **la du fojoj**, ke vi vizitis min, mi estis tre feliĉa. La parolanto uzas la frazparton *la du fojoj* por identigi du fojojn, kiujn la aŭskultanto konas. (Legu ankaŭ pri la uzo de *ke post fojo*.)

- **La multaj gastoj** restis ĝis noktomezo. La parolanto ne volas informi, ke la gastoj estis multaj, sed parolas pri ili per la okaza nomo *la multaj gastoj* supozante, ke la aŭskultanto jam aŭdis pri ili.

- *Vi diris tion jam du fojojn.* Ĉi tie la identeco de la fojoj ne gravas. Oni ne volas identigi la fojojn, sed nur nombri ilin. La frazo povas respondi al la demando: *Kiel ofte (kiom da fojoj) mi diris tion?*

- *Venis multaj gastoj al via festo, ĉu ne?* La gastoj ja estis certaj individuoj, sed ĉi tie la frazparto *multaj gastoj* nur servas por informi pri la kvanto de gastoj. Iliaj identecoj ne gravas.

Literaturaĵoj

Teresa Nemere

Esperantlingva “Sinjoro Tadeo” jam 100-jara

Ĉijare pasas 100 jaroj post la unua aperigo de tradukita al Esperanto la ĉefverko de Adam Mickiewicz - "Sinjoro Tadeo".

Ne estas facile kredi, ke tio okazis nur 20 jaroj kaj kelkaj monatoj post la ekapero de la unua lernolibro de la kreita de Ludoviko Zamenhof internacia lingvo, populare nomata Esperanto. Multaj homoj, ankaŭ specialistoj, opinias, ke la traduko estas bonega kaj, ke dank' al ĝi la pola epopeo estas konata larĝe en la mondo. Ĉu same larĝe konata estas ankaŭ la tradukisto? Ĉu vi scias, ke Antoni Grabowski, kiu tradukis la verkon de Mickiewicz, estis kemiisto? Kiu scias, ke li, ekhavinte la unuan lernolibron, kiel li mem skribis poste en Pola Esperantisto, ellernis Esperanton dum unu aŭ du tagoj? Estas ankaŭ aliaj interesaj faktoj, kiujn meritas ĉeokaze ekkoni, egz, tio, ke la tradukinto bezonis nur 2 jarojn por traduki la tutan verkon kaj, ke nun en Pollando estas troveblaj 3 memortabuloj omaĝe al tiu geniulo. Kiu scias, kie? Sed, antaŭ ĉio, ni ne evitu la okazon kaj, dum la jubilea jaro, ni revenu al la traduko kaj ĝuu la rakonton de A. Mickiewicz pri la grava momento de nialanda historio kaj lertecon de Antoni Grabowski, kiu tradukante "Sinjoron Tadeon" montris kiel utila, elasta kaj belsona estas la internacia lingvo. En la traduko estas multaj interesaj partoj, certe ĉiu havas sian ŝatatan fragmenton. Mi proponas rememorigi la faman koncerton de Vojski:

...”Tiam Vojski ekkaptis sian pasamente
Ligitan bubalkornon, boao serpente
Torĝitan, longan, strian; al buŝo ĝin metis,
Plene blovis vangojn, sange okul' briletis,
Duone fermis palpebrojn, ventron entiris,
En pulmojn provizon de la aero spiris
Kaj ekludis. La korno, kiel vent' senhalta,
Portis muzikon eĥe tra l' arbaro alta.
Eksilentis pafistoj kaj bestopelantoj,
Mirante harmonion kaj forton de kantoj.


Maljunul' sian arton, faman en la mondo,
Nun refoje prezentis al ĉasista rondo.
Li plenigis, vivigis ĉasejon, kverkaron,
Kvazaŭ li por komenco enlasus hundaron.
Vigla alvok' historion de la ĉaso donis:
Ĝem' post ĝemo hurletas: jen hundoj ludado;
Iam tono pli akre tondras: jen pafado!
Li ĉesis, kornon tenis; pensis aŭdantaro,
Ke ludas li, sed ludis - eĥo tra l' arbaro.

Li blovis ree. Korno kvazaŭ formŝanĝante,
En buŝ' de Vojski malpli, aŭ pli dikiĝante,
Imitis bestajn voĉojn: jen lupu malsata
Hurlas per ĝemo longa, terure trenata.
Poste el ursa faŭko muĝo vaste bruas
Poste ura blekado aeron traskuas.
Li ĉesis, kornon tenis; pensis aŭdantaro,
Ke ludas li, sed ludis — eĥo tra l' arbaro.
Aŭskultinte la arton de korna ĉefverko,
Ripetis ĝin la fagoj kaj kverko al kverko.



Li blovas; ĉu en korno estas kornojcento?
Aŭdiĝas mikse krioj, kolero, lamento,
De homoj, hundoj, bestoj, ĝis Vojski korntubon
Levis kaj per triumfa himno, batis nubon.
Li ĉesis, kornon tenis; pensis aŭdantaro,
Kiom da arboj, tiom da kornoj sin trovis,
Kaj kiel ĥoroj eĥe la kanton reblovis.
Sonis muziko ĉiam pli vasta. pli hela,
Kaj ĉiam pli mallaŭta, pli pura, pli bela,

Mi ne estas geniulo



La titolo de tiu ĉi skribaĵo iluzie estas nenio originala. Multaj el ni, se ne diri: preskaŭ ĉiu, povas tiel diri pri si mem. Ankaŭ mi bone scias tion, kvankam mi iam diras al mi mem „vi estas geniulo”, kio okazas precipe tiam, kiam mi sukcesis fari iun eksterordinare malfacilan taskon, kiam ŝajnis al mi, ke mi tute facile povis tiam fiaski.

Sed iel tiel, intuicie, en malfacila tempo la aferoj iafoje ŝanĝiĝas, kaj ni venkas nin mem, kio plenigas nian koron per ĝojo.

Do, estante kutime ordinara persono, mi tamen ĝojas, ke mi kapablas rimarki kaj admiri verajn geniulojn, la homojn, pri kiuj oni parolas, ke ili estas pridonacitaj per de Dio, Naturo, Providenco. Nur ne neu, karaj, ke vi kaj mi dankŝuldas nian ekziston al ni mem, aŭ nur al niaj gepatroj, ĉar nek mi, nek vi scias, kia estas la vera deveno de la homo. Sed mi ne intencas hodiaŭ okupiĝi pri tio.

Do, estante tia ordinarulo, kiu de tempo al tempo sentas sin „geniulo” kaj kiu kun ravo alrigardas aliajn homojn, eĉ tiujn iom pli talentajn ol mi mem, mi devas esti kontenta, ke mi povas „partopreni” en la *genieco* de la aliaj. Kiel tio ĉi okazas? Tutsimple, mi, antaŭ ĉio, aŭskultas virtutojn de instrumentoj, kaj farante tion mi forflugas malproksimen, mi sentas iun neimageblan feliĉon en la koro, mi travivas mian propran eksterordinarecon, kaj poste mi deziras renkonti alian homon, kiu travivis ion similan, tiel kiel mi.

Niaj travivaĵoj esta io, kion neniu povas de ni forpreni, ili estas io, kio, kvankam daŭras nur momenton, ofte estas iu senco de nia vivo. Plurfoje mi jam travivis tiajn momentojn, kiam mi ekkonsciis, ke mi vivas, por povi travivi ĝuste tiajn momentojn de ekscito. Kaj, malgraŭ ke ĉio ĝis nun estis iasence mizera, tiumomente oni konstatas, ke valoris ĝisvivi tiun tagon, kaj nenio alia gravas!

La ekzisto de geniuloj rememorigas al ni, ke estas eblaj neeblaĵoj. Ofte ni trovas geniulojn inter sciencistoj. Ni al kutimiĝis apreci Ejnŝtejnnon, kvankam la hodiaŭa scienco pritraktas plurajn fenomenojn laŭ aliaj kriterioj. Estas imageble, ke en la senfino de la mondo ekzistas ankoraŭ multe pli da nescio, kaj la homo, malkovrante ĉiam pli novajn angulojn de la penso devus esti multe pli humila ol ŝajnas tio al multaj el ni. La homo estas genia, sed ĉu antaŭ la homo ne estis pli potenca penso, kiu ĉion ekmovis?

La homoj interŝanĝas inter si siajn sentojn kaj pensojn. Ofte oni aŭdas, ke ies pensado apogas alian personon, kiu dank' al tio ricevas specialan forton. La spirita ekzisto de la homo estas ŝajne io komprenebla kaj ofte grava. Ni volonte esprimas bondezirojn al aliaj homoj, kaj se tio estas sincera kaj ni kredas, ke tio plenumiĝos,, niaj bondeziroj havas grandan forton.

Ofte ni antaŭsentas, ke en nia realo io ne iras tiel, kiel ĝi devus. Ni intuicie diferencigas veron_de falso, ĉar ni havas la kapablon observi la vivon, kiu nin ĉirkaŭas.

Genia estas ĉio, kio estas harmonia, logika kaj simpla. Tian mondon, *plenan de genio kaj geniuloj*, mi bondeziras al vi!

Leterkesto



Stenia Romanowicz

Depeŝo el Japanio

Mia amikino, japana esperantistino, raportis:

„Ni ĝisatendis *Sakura* – *no* (floranta arbo), nomata ankaŭ *Hanami* (festeno de floroj). La ondo de ĉerizfloroj fluis el sudo kaj alvenis al la japana ĉefurbo – Tokio. La Japana Meteorologia Agentejo anoncis tion oficiale. Sekvis la ĝoja tempo de rigardado de florantaj arboj, tempo de ludoj, festoj kaj la printempa libera tempo por junularo.

Ankaŭ mi, ravita, promenis kun miaj genepoj por rigardi la ĉarmajn florojn de ĉerizarboj – la simbolo de mia patrujo. Mi preparis la tradicion manĝon *dango* (rizaj globetoj). Ni ne drinkis sakeon nek bieron, ordinare uzataj en la festa tempo.

Hanami havas kelkcentjaran tradicion. La feston iniciatis la mikado Saga, en la oka jarcento. Sekve, transprenis ĝin aristokratoj kaj samurajoj, kaj nun festas ĝin la tuta popolo. La festo signas ankaŭ komencon de printempo, la ŝanĝojn en la vivo de japanoj, sed samtempe estas la periodo

por planti rizon. Al tiu, kiu pli ŝatas festi ol admiri ĉerizujojn, oni diras: „Pli bona *dango* ol floroj.”

Hanami simbole prezentas la homan vivon - ĝian mallongedaŭran belon. *Sakura* estas simbolo de Japanio kaj nur de Japanio.

El la ĉeriza ligno japanoj faras meblojn, objektojn por ĉiutaga uzo, ekzemple: skatolojn por mangĝbastonetoj kaj kuleretoj. Arboj kaj floroj de ĉerizo estas temo de multaj pentraĵoj kaj aliaj artmotivoj. Pri ili oni kantas kantojn kaj verkas poemojn. Printempe - Motoko Uekusa.



Jagoda Greger

"Esperanto sur strando" en Gdynia

Gdynia estas la plej bela frukto de la akirita antaŭ 100 jaroj sendependeco de Pollando.

Celante rememorigi tiun ĉi fakton, la triurbaj esperantistoj decidis celebri la datrevenon, kadre de jam tradicia aranĝo "Esperanto sur strando", en tiu ĉi urbo.

Dum la jubilea jaro, en la tuta lando, oni rememorigas diversajn personojn, kiuj grave rolis en la batalo por liberiĝo kaj dum kreado de la nova vivo. Tutlande estas konata kaj omaĝata Józef Piłsudski, en Poznań Ignacy Paderewski, en Silezio Wojciech Korfanty. En Kaŝubio agis nia pomeria heroo Antoni Abraham – la "Reĝo de Kaszuboj", kiu, bedaŭrinde, ne estas bone konata en aliaj regionoj.

Dum nia aranĝo, ni strebos prezenti tiun legendan personon kaj lian agadon. Ni ankaŭ rememorigos historion de la ŝipo MS "Zamenhof", por kiu, dum 20 jaroj la haveno en Gdynia estis "patrinhaveno".

Ni kore invitas al la 6-a "Esperanto sur strando", kiu okazos la 7 - 9-an de septembro. <torentosopot@wp.pl>



Marc Konijnenberg,

Fotokonkurso por ĉiuj!

„Atentu, samideanoj ✨

Aŭguste ĉi-jare, okazos la unua „Vikio Amas ZEO-jn” - fotokonkurso en Vikipedio. 📷 Ĉiuj rajtas partopreni! 🐰

Dum aŭgusto, sendu viajn fotojn de Zamenhof/Esperanto Objektoj! Tiel vi helpos 🤝 la movadon enregistrante la historian heredaĵon de Esperantujo 😊.

Ĉu vi ankoraŭ ne certas? Nu, la gajnontoj ricevos monon! 💰
Sciigu la Esperantistarojn pri tiu nova konkurso 📣

🗨 Pliaj informoj:

https://commons.wikimedia.org/wiki/Commons:Wiki_Loves_ZEOs_2018?uselang=eo „



Tobiasz Kubisiowski

Fotokonkurso por la jubilea jaro de PEJ

Pola Esperanto-Junularo anoncas novan fotokonkurson por PEJ-membroj (la nunaj kaj la iamaj!) kaj ĉiuj amikoj de PEJ, por festi la jubileon de 60 jaroj ekde la fondo de PEJ!

Festu kun ni! Sendu al ni viajn plej interesajn, gravajn, amuzajn kaj/aŭ kortuŝajn fotojn, kiuj montras momentojn el la historio de Pola Esperanto-Junularo – eventojn, kunsidojn, laboradon, diboĉadon ktp.

Ĝi povas esti historiaj nigraj-blankaj fotoj el viaj privataj arĥivoj aŭ ĵus elŝutitaj de saĝtelefonoj – gravas ke ili rilatu al la temo kaj estu ciferece disponebla en kiel eble plej bona kvalito.

Fotojn sendu al la adreso konkurso@pej.pl aŭ al la adreso Pola Esperanto-Junularo, ul. Gen. W. Andersa 37/59a, PL 00-159 Warszawa, Pollando. La regularo troviĝas ĉe www.pej.pl/eo/konkurso

La fotojn, ricevitaj poŝte, ni skanos kaj resendos al la posedanto.

Postmilita strata fotisto en... Varsovio(?)



Kalendaro - 2018

18-23.04. 2018	Esperanta Printempo en Szczecin	Filio de Pola Esperanto-Asocio en Szczecin. lobacz.k@onet.eu
19-20.05. 2018	Sesa Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj en Wrocław	Eŭropa Centro de Interkultura Edukado en Wrocław, informado.eo@gmail.com
19-25.05. 2018	70-a IFEF Kongreso en Wrocław	Internacia Fervojistaj Esperanto-Federacio Silezia Esperanto-Asocio https://ifef.wroclavo.damj.es/
26-28.05. 2018	37-a Pola Esperanto-Kongreso en Zabrze	Estraro de Pola Esperanto-Asocio estraro@esperanto.pl
1-3.06 2018	31-aj Esperantaj Tagoj de Krakovo en Kulturcentro Podgórze (Centrum Kultury Podgórze), str. Sokolska 13 en Krakovo, http://www.ckpodgorza.pl	Krakova Societo Esperanto kse.krakovo@gmail.com http://www.kse.cba.pl/aligxilo/
9.06. 2018	Esperanto-stando dum 22-a Scienca Pikniko en Varsovio ĉe Nacia Stadiono „PGE Narodowy”	Varsovia Filio de Pola Esperanto-Asocio alvamo@wp.pl
17.06. 2018	Montara Renkonto sur Ĉantorio la Granda en Beskidy Montaro	suchanekj@seznam.cz
12-23.06. 2018	40-a Ĉebalta Esperantista Printempo en Mielno	Filio de Pola Esperanto-Asocio en Gliwice stanislaw.mandrak@gmail.com
2-4.08. 2017	Esperanta stando dum PolAndRock Festival - en Kostrzyn ĉe la rivero Odra. Renkontiĝo por memzorgantoj ene de la granda rokmuzikfestivalo	Centro de Interkultura Edukado Halina Komar halinakomar@gmail.com
1-9.09. 2018	51-a Internacia Esperanta Feriado en Łądek Zdrój	Silezia Esperanto Asocio Teresa Pomorska, pomer@wp.pl
7-9.09. 2018	Esperanto Sur la Strando - 2018 Gdynia – Sopot. Temo: „Nia m/s „Zamenhof”	Triurba Esperantista Asocio Torento torentosopot@wp.pl https://sites.google.com/site/esperantowsopocie/ FB – esperantowsopocie.pl
10.2018	42-aj Esperantistaj Preĝtagoj en Częstochowa	Pola sekcio de IKUE pomer@wp.pl

21-23.09. 2018	34-aj Artaj Konfrontoj en Esperanto „Arkones 2018” en Poznań	E-SENCO Kultur-Socia Societo je la nomo Ludoviko Zamenhof en Poznań. http://www.arkones.org/eo/
16-18.11 2018 ?	Esperantista renkontiĝo GRUPE - 22 en Gliwice	PEA, filio en Gliwice, stanislaw.mandrak@gmail.com aŭ: staman@ka.onet.pl
14-16.12. 2018	19-aj Bjalistokaj Zamenhof-Tagoj en Bjalistoko	Bjalistoka Esperanto-Societo pwierzbowski@gmail.pl
28.12-4.01 2019	10-a JES Junulara Esperanta Semajno en Hirŝluĥ (Storkow-Mark) apud Berlino.	Pola Esperanto-Junularo www.pej.pl , http://jes.pej.pl/2016/

Oni eldonis

Sukceso! „Sukceso per Esperanto” jam eldonita!



Lernolibro en tri partoj
“Sukceso per Esperanto”,
 parto 1, 2, kaj 3.

Aŭtoro: Edward Malewicz
 Grandeco: A4- 21 x 30 cm.

ISBN 978-83-934054-2-8
 ISBN 978-83-934054-4-2
 ISBN 978-83-934054-8-0
 Eldoninto: Eŭropa Centro
 de Interkultura Edukado

Forpasis

La 1-an de aprilo 2018 en Istebna mortis fama instrumentalistino, poetino kaj esperantistino **Zuzanna Kawulok**. La entombigo okazis la 5-an de aprilo 2018 en tombejo en Istebna.
Pola Esperanto Asocio – Filio en Bielsko-Biała

La 1-an de aprilo 2018, en Koszalin mortis instruisto kaj esperantisto **Waldemar Nowakowski**. La entombigo okazis la 9-an de aprilo 2018 en tombejo Komunalny en Koszalin ĉe la str. Gnieźnieńska 44 (familia tombo, sektoro P-33, vico 20, tombo 2).
Andrzej Broda

La 15-an de aprilo 2018, en Lublino forpasis 82-jaraĝa esperantisto **Czesław Biedulski**. La ceremonio de entombigo okazis lunde – la 23-an de aprilo 2018 je la 12:00 h.
en lublina tombejo ĉe la strato Lipowa.
kun bedaŭro, informas, Alina Mozer

Nia fotogalerio

Bjalistoka Esperanto-Societo

Kurte el Bjalistoko

Infanoj de la komunuma infanĝardeno n-ro 52 "Winnie la Pu" vizitis la 14-an de aprilo statuon de Zamenhof por rememori la mortodatrevenon de Ludoviko Zamenhof. La infanoj ricevas edukadon pri diversaj kulturoj. Metante ŝtonetojn ĉe la statuo ili imitis la judan kutimon meti ŝtonetojn sur tomboŝtono. Fine de ilia vizito, ili kantis en Esperanto. Por tiu evento, la infanojn pretigis Elżbieta Karczewska kaj instruistoj de la infanĝardeno.

La 15-an de aprilo 2018 en arbarego Knyszyńska hazarde renkontiĝis bjalistokaj geesperantistoj, eŭropaj gevolontuloj kaj la turisma, bjalistoka grupo "Mozaika". Ĝis vespero ili kantis, babilis kaj dancis ĉe komuna lignofajro. Ne gravis, ĉu partoprenantoj estas junaj, aŭ maljunaj - ĉiuj sentis kiel unu granda homa familio.



La bjalistokaj EVS-volontuloj kaj anoj de la bjalistoka turista grupo "Mozaika" en la Arbarego Knyszyńska

Esperanto-Libraron en Zamenhof-Centro vizitis la franca familio el Dijon kun malgranda knabino denaske parolanta Esperanton. Ili vojaĝas aŭtomobile tra Eŭropo kaj vizitis Bjalistokon. La patro prenis de la biblioteka breto libron kun fabelo kaj komencis laŭte legi ĝin. La knabino aŭskultis atente. Mirinda momento!





Infanoj de la komunuma infanĝardeno "Winnie la Pu" ĉe monumento al L. Zamenhof



La 21-an de aprilo 2018, dum kunveno de PEJ en Lublino, elektigis Estraro de PEJ por la oficperiodo 2018–2019. La novan Estraron konsistigas: Tomasz Szymula – prezidanto, Romualda Jeziorowska – vicprezidanto, Tobiasz Kubisiowski – sekretario, Piotr Hołda – kasisto




Józef Golec kun infanoj


NIA FOTOGALERIO



Aleksander Zdechlik renkontiĝis kun esperantistoj en Radom



Informaĵo pri PEA en Radom kaj Antoni Dorosz ĉe surstrata E-stando



Kunveno de Esperantistoj en Bydgoszcz, kiuj festis la 110-an jubileon de E-movado